

PENSEO


N-ro 393

jul. / 2024

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Ángel Arquillos (Hispanio)



Plendo al la juneco

Ĝistere kliniĝanta mi pardonpetas al vi,
sed vi akre ridetas kaj krude mokas al mi.

Miaj fortoj malfortiĝas kaj mia korp' maljuniĝas,
sed mia menso plu
sopiras al la viv'.

Mi tre amas vin, juneco,
sed kun granda rapideco
vi ekfuĝas for de mi.

Timigas min la soleco
kaj krome la mallerteco,
minacante mian menson
misformante la reflektion
de mia ĉambra spegulo.

Mia di'
kio okazas al mi?
Senforta
pro la mallum'
mi ne regas la tempon,
kaj tre lacas...
kaj eĉ varmetaj larmoj
ruladas
sur mia vizaĝo pala...

Almenaŭ helpu min
trairi la kotecan vojon
por atingi la necertan...
celon

de la dua nova viv'.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Mi, ŝlosita en la ŝtato militanta
per alies kruda vol' senhonta,
ne plu vagas instruanta, kanta
en amike akceptanta vasto monda.

Sed aŭroro venas ja ĉiumatene,
sunsunsubir' fascinas ja ĉiuvespere,
kaj destino mia, ŝajne, gvatas bene
nun restadon mian daŭran sur la
Tero.

Mi aspergu malavare miajn plantojn
dum vespero post varmego soifiga,
kaj zorgeme metu vortojn en la
kantojn,
sur ekran', mia fenestro interliga.

Refreŝigu miajn pensojn rikoltado
en mondet' fekunda de ĝardeno mia,
kaj la revoj plu impetu laŭ la pado
poemiga, sentoplana, nostalgia.

Rememoroj helaj vagas en la
ĉambro,
la aspiroj min envolvas pli kaj pli,
do
en la vivo poreterne restos ĉarmo,
kaj ne estos poreterna la milito.

* * *

Imagu, mi tenas cent pinojn en mia mano!
Mi plantos ilin ĉi tie, en la arbarkampo,
kaj junan arbaron spronos kreska elano,
kaj pinan aeron vivigos kukola kanto.

Kalkulu, kukolo, la jarojn de vivo longa
por tiuj pinetoj kaj, certe, por mi, la peka,
kaj venu mi tiun arbaron kun mia virino
blonda,
kaj ene de l'pin-paradizo ĝermiĝu la homo
eka.

Ne tuŝu la pinojn obusoj, nek incendioj,
Ĉeestu kvieto ombra dum ĉies feliĉaj horoj,
ja tiuj pinetoj, tenataj de mi hodiaŭ
meritas estonton pacan. Samkiel homoj.

* * *

Por la fascina vorto "floro"
ĉeestis riĉa rim-elekto -
"langvoro", "koro" kaj "amoro"
furoris en la interplekto.

Ne lezis la animon boro
mizerikorda kaj kompata,
nur ĝojon portis ĉiu horo
en la amika rondo frata.

Alias tempo. Nun angoro
obsedas ofte la animon,
kaj por la ĉarma vorto "floro"
vanuas nun konvena rim' en

la streĉa cerbo. Nek "laboro",
nek "oro" taŭgas ĉi-momente,
do mi laŭ multjardeka moro
alian ĉasas intersente.

Sen revoj pri la monda gloro,
orgojlaj, plumpaj kaj banalaj,
mi rimas "floron" kun "doloro",
ĉar ambaŭ estas aktualaj.

* * *

Koloro flava - kolor' perfida
Laŭ onidiroj kaj antaŭjuĝoj,

Sed tamen plantis kelkiom mi da
Lilioj flavaj anstataŭ ruĝaj,
En mia koro ĉiam tenante
Miajn kuzinjojn kaj mian onjon -
Pelataj, ili sin trenis lante
En gaskameron, inferan mondon.
Sed flugis fulge l'animoj puraj
Al la helbluaj kampoj ĉielaj.
Iliaj kulpoj ja estis nuraj -
La flavaj floroj, la flavaj steloj.

Eto (Ĉinio)

Mi havas propran liberecon

mi kaŝas min
en la koro
mi dancas
en mia koro
mi ĝuas diboĉan vivon
la plej senĝenan
sendepende de
beleco kaj hideco
nur mi sola
aprezas la florojn
pompajn en mia cerbo
diversspozajn kaj buntajn
la maro vasta
kaj senlima
ondadas bele
kaj pretas sinki
kune kun la suno
en mia koro
libere irante tra
mia tuta korpo
al la loko
je nur unu colo
al mia koro
la arbaro nebulas
en nuboj kovrantaj
la stepo estas
mia lasta
ripozejo

Vento en majo

konata gusto
konata voĉo
maturiĝas la semoj
en ŝvito
donu venton
al la sunlumo
la lingvaĵo de
malsato plendas
pri la labora peno

la vento ellernis
belajn versojn
ĝi montras sin
paradema
antaŭ niaj okuloj
mi neniel
forĝegas la fuguron
en la vento
kun disverŝitaj
ŝviteroj
mi klinas min
por levpreni spikojn
kiuj estas feliĉo
de espero
la vivo komencas
tiamaniere
ni amu do
nian vivon

malgraŭ la tempo
forpasinta longe
ni prenas penikon
ĉiam en nia mano
por pentri
iomon kaj iomon
en nia vivo
sunlumo vekigigas
ĉiam de nia voko

kun cigaredo bruligita
ĉe la buŝo

mi spektas
la venton kuri
super la tritikaj ondoj
en la sunlumo
malhele orflava
kiu similas al
belaj dancŝuoj
premante kurbe
la kapojn
alte levitajn
ridsonoj de feliĉo
en la kampoj
disvastiĝas lante
lante...

Antanas Vaitkevičius (Litovio)



Spegulo

Komforte estas ne posedi la vizaĝon
Kaj havi karakteron sen difin' -
Similas mi jen al persono aĝa
Kaj tuj aspektas ĉarma belulin'.
Respeguligi povas mi la tutan mondon -
Ĉielon vastan, ondojn de la mar',
Eĉ nekonkereblajn altajn montojn
Posedi povus mi en mia proprajar'.
Ekzistas tamen unu obstakleto ĝena,
Kiu detruas miajn revojn pri liber':
La mastro mia tre malofte tenas
Min en la manoj, por ke mi vidu ravojn de la
ter'.

Luiza Carol (Israelo)



Aŭtuna sunsubiro

(laŭ la vjetnama poemformo "ses ok")

Fajra ov' ruliĝas

en ĉielo, iĝas

ora

kaj orangkolora

en alteco fora.

Maro

ŝajnas flua fajro

en spegulondaro.

Iĝas

vente, malvarmiĝas.

Kvazaŭ frakasiĝas

I'ovo

fajra, en la blovo

venta kaj la movo

nuba.

Ruĝas maro suba,

ruĝas ĉiel' supra.

Fora

nub' violkolora

rampas alg-odora.

Ombraj

formoj multenombraj

amasiĝas sombraj.

Venas

blovo kiu sternas

nokton. Lumo tremas,

svenas.



Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Letero

Saluton, kiel fartas, mia kara?

Ĉu ĉio estas bona en la viv'?

Vi estas juna, meditema kaj belhara,

Rigardo plenas je atendo kaj naiv'.

Nenion scias vi pri tag' estonta,

Ne scias pri la okazaĵoj sur la ter',

Futur' ne estos sennebula, sed feliĉe

Plenigis koron vero kaj esper'.

Ne scias vi pri la forpaso de amikoj,

De la karuloj, pri doloro de anim',

Dum jaroj junaj temp' pli ofte "sunas"

Feliĉa vivo, sen ĉagreno kaj sen tim'.

Ĉe ĉiu homo sama sent' aperas,

Malnova kiel mondo histori',

Vizaĝo ŝajnas fremda kaj konata,

Kaj flugas la leter' de mi...al mi.

* * *

Amikoj karaj, fartu bone!

Eĉ se ni ne parolis longajn jarojn,

Kaj eble ne ekkonos unu la alian,

Ŝanĝiĝis la vizaĝoj, iĝis grizaj haroj.

Ni ne komprenas eble multon,

La mondo diktas leĝojn kaj regulojn,

Fariĝi povas bonaj geomikoj

Nur nekonataj konatuloj.

Ne gravas tio, fartu bone

Kaj bonon gardu en la koro,

"Amiko" estas kara vorto,

Nin unuigas rememoroj!

* * *

(Fablo)

En la arbaro - ĉiujare

Konkurso kanta - aktualas,
 Kaj dum jardekoj, kompreneblas,
 La konkursantoj bestoj estas.
 Konkurson gvidas, juĝas urso,
 Ursidoj sidas, aŭskultas.
 Partoprenantoj - alkoj, lupoj
 Leporoj, procionoj, vulpoj.
 Preparis ĉiuj sian kanton,
 Muĝadon, kvikon eĉ kriadon,
 Aktive ĉiuj penas kanti
 Sukcesi ŝancon sian kapti.
 Ne gravas, ke forestas aŭdado,
 Sed gravas la manier' de prezentado,
 Ne gravas, ke forestas harmonio,
 Jen mel' pripensis stilon sian.
 Komision' - serioza, grava,
 En ĉiu juĝo estas prava,
 Decid' komuna estas "justa"
 Plej bone kantas, kompreneble, ursoj!

Forflugis birdoj el arbaro,
 Ne sonas tril' de najtingalo,
 Malĝoje la leporoj saltas,
 Arbaro "novajn" kantojn kantas!

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Aforismoj

La korpon vundas
 ekscesa ekstazo kaj
 penson inundas.

L' anim' serenas
 ĉe regula meditat'
 kaj viglo plenas.

Koro infana
 ne ankoraŭ vulgaras
 kun anim' sana.

Signifon vidas
 ni de la vivo, se ni
 veron avidas.

Ne daŭras virto,
 se oni arogantas
 kun fier-flirto.

Tuja retreto
 en senlirejo 'stas
 saĝa dekreto.

La donacemo
 estas karmplena kiel
 kultiva semo.

Stelplena ĉielo

Mi rigardas alten la ĉielon
 rememore la Eden-fabelon.
 Palpebrumas steloj jen mistere
 dum la lun' serenas nun tenere.
 Briz' susuras flirte tra vespero
 kvazaŭ flustro ame en etero.

Vasta la spacego ja senlimas
 kaj eterna lumo glorie glimas.
 Serĉas mi arkanon d' universo
 kun konscio sankte en disperso.
 Batas nun flugilojn la anĝeloj
 inspirante nin kun di-riveletoj.
 Mia koro batos plue

Ĉiun nokton en la sonĝoj
 mi vin vidas kaj vin sentas,
 tiel scias mi, ke vi ĉeestas.

Transpasinte la distancon
 kaj vast-spacojn inter ni jam,
 vi venintas montri, ke vi ja alestas.

Diste aŭ proksime, kie ajn vi estas,
 kredas mi, ke l' koro batas ja plu.
 Vi denove jen malfermas pardonon,
 kaj en mia koro vi ĉi tie estas,
 kaj la koro mia batos plu kaj plu.

Amo povas tuŝi nin jam unufoje
 kaj dum tuta vivo plue restas,
 kaj neniam velkas nur ĝis ni foriros.

Amo estis kiam mi vin amis
 ĉe la ĝusta tempo, kiun mi kaptintis,
 mia-vive ĉiam ni antaŭen iros.

Timas mi nenion, dum vi apudestas,
 scias mi, ke l' koro mia batos plu.
 Ni por ĉiam kune restos tiel,
 en la koro mia vi sekura estas,
 dume mia koro batos plu kaj plu.

*Tradukis Yi Qiao laŭ liriko "My heart will go on" de
 Well Jennings, melodio de James Horner, prezentita
 de Celine Dion*


La verdstepo

La verdstepo en nordokcidento,
 por juneco nia jen deĵoras.
 Tie ĉiam flosas freŝa vento,
 mi pasinton ofte rememoras.

Fore staras alte blua monto,
 birdoj sor flugilojn gaje svingas.
 Tra kamparo lirlas klara fonto,
 florarmaro al ĉiel' atingas.

Tie ŝvebis via milda kvero,
 mia kor' batadis jam ekstaze.
 Korinklinaj tiam kun sincero,
 ni pasie kisis laŭokaze.

Tuj jardekoj estas jam pasintaj,
 sed resonas ĉiam ridoj tintaj.



Flugiloj de printempa vento

Per flugiloj de printempa vento,
 tra l' ĉiel' mi vagas kun novsento.
 La arbaro vastas jen susure,
 dum zefiro flirtas nun murmure.

Rojoj lirlas en valo zigzage,
 kaj kukoloj trilas ĉiutage.
 Henas ĉevaloj sur fora stepo,
 ŝafoj migras kiel nuba ŝvebo.

Jen la dista maro onde muĝas,
 dum levanta l' suno glorie ruĝas.
 Al lontana monto mi tuj soras,
 kaj l' junecon oran rememoras.

Brizo ŝvebas lante idilia,
 mia koro trancas jam ebria.
 Sekve d' armistico laŭracie,
 flugos packolomboj sunradie.
 La plej proksima al paradizo

Jen Tibeto, tegmento de l' mondo,
 Everesta krutas la neĝmonto.
 Tibetanoj vivas laŭ antikva voko,
 kaj estas fieraj pri sia hejmloko.

Ili fartas simple sen riĉeco,
 tamen kredas je budhisma deco.
 Morto ne estas timinda efektive,
 reenkarniĝ' okazas definitive.

Jen platform' de Entombig' Ĉiela,
 korpstumpoj iĝas almoz' modela.
 Vulturaro plonĝas al festeno,
 l' animoj savitas en soleno.

Soras al ĉiel' anim' libere,
 tuj reenkarniĝas laŭprefere.
 Kun memoroj de antaŭa vivo,

komenciĝas nova cikl' en drivo.

Jen la plej proksima lok' al paradizo,
oni kondukas laŭ Budha organizo.

Blazio Vaha (Hungario)



Bonhumora matenkanto

Eble mi baldaŭ mortos,
estos mi mortinta,
ne plu gravos por mi,
kiom memorinda.

Mi ja insistus vane
pri mia korp-konsisto,
do, min ne interesos
eĉ propra stulta tristo.

Kiuj persisti volas,
tiuj persistu brave.
Pripensu ĉion bone,
kaj trovu celon trafe.

* * *

Se vi estas prava,
vi do estas prava.
Jen la fin' de strofo.

Se vi estas brava,
vi do estas brava.
Fin' de dua strofo.

Jen, mi komunikas,
ke mi min esprimos,
se mi bone rimos.

Fort' ne estas vorto.
Vorto estas forto.
Forton vort' esprimos.

Pri sukces' rezignu:
poemfinon signu

demanda kri-signo!

Tri esperantuloj

Jen praktika esperantisto.
Li fruktuzas nian lingvon.
esperantismoj estas
ne li, sed iuj aliaj.

Kaj jen, esperantismo:
pledas li por Esperanto.
Espereble, li samtempe
uzas Esperanton ofte.

Sekvas esperantologo.
Jes, li Esperanton studas.
Dum li studas, studas, studos,
diras vi: ĉu li konkludos?

Jadranka Miric (Serbio)



Amo, kredo kaj espero

Amo, kredo kaj espero
kiel bazaj eroj por vivotento.
La unua subtenas la aliajn du
por naskiĝi pli forta sentimento.

Amo, kredo kaj espero
enteksitaj estas en tradicio .
Ĉiu homo povas misvagadi
tamen ĉiu fine revenos al la
savanta beata situacio!

* * *

Liaj okuloj plenas de sopiroj.
En liaj manoj dolĉaj piroj.
Sur miaj lipoj rido,
pro jam donacita viola irido!

Vaste etendis la manojn vi
por ke forte brakumu min. Mi
senhalte kuras al vi brakumo varma.

Ridas mi kun okulo larma.

Kredo

Dolore mi pensas pri vi.
 Longe, tre longe daŭras tiu malsano.
 Elĉerpita estas vi,
 ege zorgema estas mi.
 Kiel araneo malsano
 plektis sian reton.
 Ĝisnune mi ne falis en kaptilon.
 “Dio donu forton” preĝas mi por via
 sano.
 El pezaj pensoj prenas min
 la birdeto pepanta sur balkono.
 Milda melodio vekis vin.
 Kreskas espero. Vastiĝas bela sono.

Beleco

Kiel blanka rozo,
 kiel baletista unika pozo,
 kiel suno, aŭ luno sur ĉiel’,
 kiel unu kulero,
 kiel saniga miel’,
 kiel ia unua kiso,
 kiel malgrava miso,
 aŭ Fama muzeo de “Madam Tiso”
 kiel la amika alvoko fora,
 kiel memoro pri via diro belsona,
 kiel ĉielarko multkolora,
 aŭ kiel stelo norda ora.

Erika Godó (Hungario)



Ke vi ĉiam restu

kiel infano

Ke vi ĉiam restu kiel infano,
 kiu havas senkulpan animon.
 Kiu ankoraŭ kredas je viaj revoj,
 kaj ne konas la kruelan realon.

Kiam la suno brilas aŭ vi vidas belon,
 miru pri ĉio bela kaj bona en la vivo.
 Ke vi ĉiam restu por infano en via koro,
 kiu vidas la mondon feliĉo kaj paco.
 Konservu ĉi tiun miraklon en vi mem,
 tiel longe kiel vi vivas sur ĉi tiu mondo.

Koloraj inkoj

Buntaj inkaj gutoj dancas sur la papero,
 ili ŝprucigis inkon subite iĝis belaj bildoj.
 Ili brilas kiel veraj perloj en perlamoto,
 ili flugas sur la flugiloj de niaj pensoj.
 Blua inko pentras la altan ĉielon blua,
 kaj ĝi kolorigas senfinajn oceanojn kaj
 marojn.
 La vento pentras sonĝojn per ruĝa inko,
 al la magia unika tolo de la ĉielo.
 Niaj plumoj kaj brosoj estas magiaj,
 ili enspiras vivon al la malsamaj koloroj.
 La riĉeco de iliaj koloroj kreas miraklojn,
 la pinto de plumo aŭ peniko estas kiel sorĉisto.

Lilia Nikolova (Bulgario)



Instruo

Post penoj, enorma sufero
 el morta, sufoka utero
 naskiĝis la viv’ grandioza—
 triumf’ simbioza ardpozas!
 Vivemas la arbo en roko
 per memofer’ reciproka:
 la roko permesas detruon
 por sperti la amaventuron,
 la arbo akceptas izolon,
 iĝante instruo de volo,
 de venk’ per sindona persisto—
 la devo de esperantistoj!



Wélington Rocha (Brazilo)



Eta suna bul'

Kiam ajn matene mi nutras min
 ĉeporden ĝi proksimiĝas,
 eta ul' el la sama di-krepov' . . .
 Por sin igi notita ĝi elmetas
 dolĉajn trilerojn (tsp tsp tsp)
 (Kvazaŭ ne rigardindus re kaj re
 tiu fajreca buleto el fajna sun' ...)
 (De kio mi manĝas, pecetojn gajnas mia
 fidela amiketa kanari')
 Alimaniere ja ne povus esti,
 tuje l' grund' pululas je bunta birdetar' . . .
 (Kompreneble pli da kuko ekflugas de mia
 tablo foren jam . . .)

Fernando Pessoa

Sen trafi aŭ vidi vin

Sen trafi aŭ vidi vin .
 Sed laŭ imagata plen'
 mia kor' suferas en
 ĉi penso al vi sen fin' .

Vin malkoni , amatin ' ,
 via ŝajna neekzisto
 tutan min lasas kun tristo
 en ĉi pens' al vi sen fin' .

Prove ĉe alia in' ,
 vin mi perdis , plu okazo
 pri ĉi nia rev-ekstazo ,
 al mia dezert' l' oazo
 de ĉi pens' al vi sen fin' !

Elportugaligis

Wélington Rocha (Brazilo)



El la ĉina antikva poezio

Li Yu (937-978)

—laŭ melodio *Reveno de amato*

L' orienta vento blovas
 al la montoj en sunlum-brakumo.
 Primavera venas, ŝi nenion
 fari dum taglumo.
 Kun falintaj floroj en disordo,
 ŝi jam ebriiĝas en korpo-konsumo.
 Ŝi malsobras jen en songo
 meze de flutsonoj, ve, en nuno.

Ne aŭdiĝas tintoj
 de pend-ornamaĵoj el la jado.
 Ŝia vesper-ŝminko jam
 en kompleta stato.
 Do, por kiu ŝi ordige kombu
 siajn harojn ja je lia ŝato?
 Jaroj haste fluas kaj la vizaĝtraĵoj
 malheliĝas plu sen delikato.
 Ĉe vespero ŝi nur sola
 sin apogas al la balustrado.

—laŭ melodio *Budhista dancisto*

Printempon serĉu
 antaŭ ol ĝi alvenos kun prospero.
 Aprecu florojn
 antaŭ ol ili velkos kun malhelo.
 Alkoholaĵo pale verda
 en vinpokal' verŝita el botelo
 bezonas levon de la manoj
 teneraj, molaj por ofero.

Kial ni ne ridet-mienas
 dum povas ni kun kontenta koro?
 En la ĝardeno reĝa
 printempo daŭras pli kun bonodoro.
 Ni drinkas kaj babilas
 dum versoj elkreiĝas jen ĉe tamburbata
 horo.

—laŭ melodio *Moruskolektanta knabino*

En aŭtun' malfrua, sub platano,
 ĉe la put' kun vinĉo ora,
 kelkaj arboj staras kun folioj
 jam falintaj sur la ter' malmola.
 La diurna pluv' ŝin ĉagrenigas
 plue al antaŭa afliktiĝ' enkora.
 Rigardante la subtilan pluvon,
 pendkurtenon tenas ŝi stupora.

Kuntirante brovojn tristajn
 ŝi plendema restas en la buduaro.
 Sian penson ŝi ekturnas al pasinto
 kaj al sia edz' ĉe fronto en batalo.
 Ŝi eksentas tumultadon en la koro.
 Dum longtempo li ne sendas pro voj-baro
 letereton al la hejmo, ho ve!
 La zigzaga Flav-rivero kun ondaro
 ja torentas kaj ĝi povas kontraŭflue
 ne ĝin porti al la edzo. Ŝi sopiras
 al li, kun ĉagreno kaj amaro.

—laŭ melodio *Korvo krianta en nokto*

Lastnokte pluv' kirliĝis en aŭtuna vento-ro-ro,
 susuris la fenestraj pendkurtenoj jen en ĥoro.

Klepsidr' malplenis, estingiĝis la kandelo,
 maltrankviliĝis mia pens' en nokt-malhelo.

La vivo fluas, kiel akvo, al la oriento,
 senspure ĝi vanuas songe en silento.

Nenio forigas ĉagrenon mian en la koro,
 krom ĝisebria drinko de likvoro.

—laŭ melodio *Dankon al nova favoro*

Ĉerizfloroj tute falis ĉe l' perono
 sub lunlumo.
 sur l' ebura lit' ŝi kuŝis kun ĉagreno
 de kor-puno.
 Afliktiĝ' lastjara samas, tamen malpli forta
 ol tiu de nuno.

La taŭzitaĵ haroj kovras ŝiajn vangojn

kun langvoro,
 ŝia ruĝa la korsaĵ' je larmoj plenas. Amsopiras
 ŝi en koro
 sed por kiu? Kun fenestr-kurtenoj kuntiritaj
 songas
 ŝi ja en torporo.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Li Bai (701—762)

Sopiro en Kvieta Nokto

La luno brilas je put',
 kvazaŭ tere prujna sput'.
 Kaplev':mi al la luno;
 kapklin':hejmsopira mut'.



Elĉinigis



Zhuang Qixiong

(Ĉinio)

Ludoviko Uhland

Printempa fido

Vekiĝis softe la aer'.
 Ĝi flirtas, teksas sur la ter'
 kaj kreas je ĉiu fino.

Ho, freŝodor', sonad' sen lim'.
 Nun estu – koro – do sen tim'.
 Turniĝi devos la destino.

Pli belas l' mond' post ĉiu tag'.
Ne estas limo por imag'.
Florado nun sen fino.

Florado eĉ en fora val'.
Forgesu – kor' – pri via gal'.
Turniĝi devos la destino.

tradukis



Hans-Georg Kaiser

(Germanio)



Pablo Milanés

Mi ja ne petas

Per blua stelo
el ĉielo ne regalu min.
Mi nur deziras
vian lumon ĉirkaŭ mi sen lim'.

Mi ja ne petas
ke, por ami, vi subskribu dek paperojn,
ne!
Mi nur deziras
ke ni ĝuu miajn karajn birdojn dum
promen'.

La pasintaĵojn ja ne forneos mi;
estontaĵoj alvenos laŭ kutim'.
Kaj en la nuno, jen mi fajfas pri homoj
kiuj ĉiam klaĉos pli.

Plenigu nepre

ĉiun minuton per motivoj por spiradi plu.
Min ne komplezu,
ne babilu, ne rifuzu nun.

Per blua stelo
el ĉielo ne regalu min.
Mi nur deziras
vian lumon ĉirkaŭ mi sen lim'.

Tradukis



Liven Dek (Hispanio)

Mao Zedong (1893-1976)

– laŭ melodio *Printempo en la ĝardeno Qin**

Neĝo

Landnorda pejzaĝo:
Glacio kovras teron de mil lioj,
tra vasta aero regas neĝa flugad'.
Jen, cis kaj trans la Granda Muro
kuŝas nur senlima blanko!
la Flava Rivero tuj restas en stagnad'.
montĉenoj kvazaŭ arĝentaj booj dancus,
Surstepe terbuloj (montetoj) kvazaŭ vaksaj
elefantoj (bestoj)
kurus prove al la ĉiel-alt'
suntage, sunruĝo kaj neĝblanko
sin brilas je pimpad'!

Patrujo kara tiel belas kiel jad',
ke multaj herooj sin klinis en kultad'.
Al Qinshihuang kaj Hanwudi manketis
klereco,
Tangtaizong kaj Songtaizu lametis ĉe versad',
filo de Dia kread'---
Ĉenĝis Khano,
lertis nur ĉe agla arkpafad'!
Ĉi ĉiuj jam pasis!
Jen nunaj elitoj
sin ĵetas en la militad'!
Elĉinigis



Gajo (Ĉinio)

Donika Dabishevci



Fuĝante pro la morto

De kelo al kelo, de vilaĝo al vilaĝo,
De pado al pado tra la markoloj.
kaŝloke, krutdeklive. jen ĉi tie jen tie.
Supren. Malsupren.

Estas multaj. nenombreblaj ili estas,
ien ajn. Ie ajn infanoj, virinoj kaj maljunuloj.
en la karavanoj senrevenaj. Tra la perditajoj
neniam bone konataj .

Sufokrevaj,
Mortesperaj.

Kun la tornistroj surdorse, kun la etuloj
surkole,
kun la vunditoj sur la inventitaj brankardoj.
Lacaj kaj malhavaj.

Malsataj ĉiuj.
Malviglaj pro unu akvoguto.

La flikoj apenaŭ kovras iliajn ripojn. Nek la
ostojn.
Kun blankiĝintaj vizaĝoj. kun kaviĝintaj
okuloj.
Kun gratenitaj lipoj. Fenditaj ostoj.
Laviditaj.

La suno ilin brogas kaj la luno ilin frostigas,
Oni ne scias kie trovos ilin la nokto kaj kie la
tago.
Kien ili iras kaj kien
ili alvenos.

Fuĝintoj falas en la kaptilon de la malbenita
tempo.

Subigitaj al la fortuno.
Sen iu ajn garantio, sen iu ajn
konfido.
Sen iu ajn eblo por daŭrigi...
Ili fuĝas kaj la morto ilin postsekvas!

La nigrasorta patrino ...

Eĉ ne pensis tion la nigrasorta patrino
Eĉ ne pensis nigrasorta patrino ke povas veni
tiu tago.

Kiam tute senhezite ŝi
Dezirus la morton de sia infano.
"Mi pteĝas, Dio mia, prenu,
eĉ malpli ol unu minute!
Mi preĝas Dio mia, prenu subite,
prenu kajme la lasu lin suferi"
Ne kredis la nigrasorta patrino ke povas veni
tiu tago,
ke ŝi ekĝoju kiam la animo de la animo
sia,
la koro de la koro sia,
tiu eta ŝafido, kiu ĵus komencis piediri
tra la paŝtejoj,
fermus tiujn belajn okulojn,
belajn bluajn okulojn.
ne por ripozi, nek por dormi...
Fermi, sed ne plu malfermi.
Neniam!

La nigrasorta patrino jam kolektis la intestojn
de la fileto.

La intestojn disajn kvazaŭ pankaco,
pro la grenadaj splitoj.
"Doloregas al mi la abdomen, patrino, ne tuŝu...
ege doloras al mi tio"...

Kvazaŭ kudrilo en la animo ĝis la tomba
tago,
estis liaj lastaj trapeladoj...

Pafado

La fera bolto falas teren. Rompiĝas,
dispeciĝas.
La pordoj de la malluma kelo disiĝas

pro la piedbatoj.

La antaŭmilitistoj grupe enverŝas
la câmbbron,
kvazaŭ sovaĝa rivero, vagada, perfortanta
ĉion kion trovas antaŭ ĝi.

La spacon dividas vortico,
rabia, kruela. Galon ili vomas
mallaŭdas kaj bruigas, kriante,
minacante. Ululoj
ne aŭditaj antaŭe de sovaĝaj
Bestioj.

Vestitaj per malvarmo, glacie
monstreca, la likvaĵojn ili elgutas, enverŝas
lascivon.
Ties dentoj.
briletas. La flusalivaj buŝoj volas
sangon.
Postulas sangon.

La infanoj buliĝas kvazaŭ idoj en la patrinaj
sinoj.
Ili kaŝas la kapojn kaj duoniĝas,
Kvazaŭ la fetto en la utero.



La patrinoj ŝtoniĝas pro la timo por la infanoj.
Eĉ voĉon por trankviligi la etulojn ili ne
havas.
nur tremojn.
Kvazaŭ lastaj lulilaj luloj.
Malamo akvumita dum la jarcentoj
eksplodas kvazaŭ dorminta vulkano.

La eltenebla lavo
elglutas eĉ la bebojn en la lulilo.
Ili

apenaŭ havas kompaton!
Ili venis nur por mortigi.

Post la pafado...
estingiĝas la vekriado de la infanoj...

Kaj kiam nenio plu aŭdiĝas,
komenciĝas la gajeco kaj la ridaĉo startas
en fremda lingvo!

elalbanigis



Bardhyl Selimi
(Albanio)

Ĉineske

Yi Qiao (Ĉinio)

Festa rito

— laŭ ĉinesko flirta kanto¹

Festa,
festa
'stas rito majesta.
Ni ardas bonhave
kaj aspiras rave.
Vera,
vera
vizio prospera.



Dolĉa kiso

— laŭ ĉinesko Belulino Yu²
Aŭroro Valentena,
amante bona
kun anim-inspira lum'
flagranta en karesa brakum'.

